2-a Jaro, N-o 19 (71) APERAS S.A.T. SEMAJNE 4. Februaro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)

Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Ekonomia mizero

Niaj esperantistoj

en Germanio aŭ ie ajn estas en kelkaj aferoj komikaj. (Mi diras komikaj por esti justa kaj milda.) Ili estas tiel konsciaj pri siaj preferoj, ke ili permesas al si malgrandajn artifikojn. Kiam oni montras al iliaj malakuratecoj, ili estas vunditaj kaj sentas sin ofenditaj. La fantomoj kaj fluegoj de l' ĉionpovanta tempo tiel pretendas ilin, ke ili perdas multon de sia specifiko kaj kunfandiĝas kun la sin ĉirkaŭanta filistreco. En pli fruaj epokoj aperis saĝaj profetoj, kiuj provis vigligi tiamajn epokanojn. Ili trovis ĉiam surdan aŭskultantaron. Multe pli atingis jam vorto kaj bildo inter la homaro.

La gazetaro

fariĝis faktoro montranta direkton. Metita en la servon de batalantaj nacioj kaj partioj ĝi donis profiton al la eldonistoj, dum la kun honesta konvinko batalantaj veteranoj de la ĵurnalismo preskaŭ ĉiuj mortis pro malsato.

Tiu ĉi bedaŭrinda ankoraŭ hodiaŭ ekzistanta fakto, tamen nepre ne malhelpis la evoluon de la gazetaro, ĝi atingis menciindan kaj plenan de mensogoj disvastiĝon kaj fariĝis envi- kaj malamoplena potenco en la batalo inter la homaro. Kovrita de sango kaj hipokritaj larmoj la gazeta papero rulas plu.

Nia inter la tutmonda homaro vivanta prolet-esperantistaro

disponas tre etan esp.-gazetaron, kiu limigas sin al malgranda medio, pensanta kaj sentanta internaciisme (sennaciisme?), kaj kiu konvulsie klopodas surpremi la stampon al la enhavo de sennaciismaj penso kaj ekzisto. La granda ampleksanta gazetaro estas ja en manoj de eminentaj esp-istoj kaj estas gvidata de espistaj intelektuloj aŭ profesiaj ĵurnalistoj, tamen tiuj sekvas tute aliajn interesojn.

Al la demandoj rilate al klaskonscieco porproletara kaj sennacieco

ilia sinteno estas indiferenta, kaj malvarmsange ili sekvas al la instrukcioj kaj tendencoj de sia gazeto. La tendenco de la gazetaro kondiĉas fremdan al sennaciismo karakteron, kiu kun la nia tute ne povas simpatii.

Rekonante la potencon de la gazetaro, la demando, kial tiu gazeto, kiu reprezentas niajn interesojn ne atingas la sufiĉan subtenon, fariĝas pli urĝa.

Sed kiam oni pli precize rigardas la tragikan komikon de niaj esp-istoj en Germanio aŭ ie ajn, tiam la doloriga respondo al tiu demando estas superflua.

Niaj esp-istoj abonas iun semajnan esp-gazeton

(duonsemajna aŭ eĉ taga ne povas ekzisti), kiu estas legata de kvin familianoj aŭ eĉ familio, kies abonpago neniu volas plenumi. La kun diligenteco kaj spirito redaktitaj nigreblankaj paĝoj estas preskaŭ indiferente, senkritike trafoliumataj por ekscii la novaĵojn de la tutmondo. Ke tiu gazeto estas skribata, redaktata, kompostata, presata kaj ekspedata, tio estas por la plejmulto memkompreneblaĵo. Ke tio kostas monon, penon, forton kaj tempon ili ne konsideras. Estas tre malfacile gajni esp-iston por espliteraturaj produktaĵoj, kiuj troviĝas sur proksima nivelo de porproletara klasbatalo. Ankoraŭ multe pli malfacila estas la enkasado de la jam sufiĉe malaltaj abonpagoj.

La senvaloraj monbiletoj estas en multe pli mallonga tempo produktataj, gajnataj kaj eldonataj nur ne de esp-istoj enkasataj.

Multe pli mizera kaj danĝera statas pri la reklam-anonca parto, kiu siaparte devus kovri parton de ĉiuj produktkostoj.

Niaj esp-istoj anoncas prefere en "neŭtrala" esp-gazeto eĉ en burĝa, ĉar de ties legantoj ili atendas pli da sukceso.

Ĉu ni posedas proletan esp-gazeton

kies kunlaboron partoprenas eminentaj proletaj publikigistoj? Ne! Kial ne? Ĉar niaj esp-istoj preferas legi presaĵon ne infektitan per proletara tendenco.

La proleta esp-ista verkisto ne povas evoluigi proletan esp-istan agadon por neproleta esp-ista gazeto, aŭ almenaŭ li devas alpreni alian pozicion al tiuj ĉi aferoj. Li ekz. devas kontraŭi la okhoran labortagon kaj izoligi sin de ĉiu alia prolet-kulturo, nur ĉar niaj esp-istoj ne volas rekoni la neceson de ekzisto kaj subteno de la proleta esp-organo.

Ni prol. esp-istoj estu klaraj, ke la gazeto estas la sola parolilo, per kiu ni povas paroli al niaj samsortuloj en aliaj landoj. Ĝi estas la sola instrumento, per kiu ni reciproke povas klerigi nin kaj kuraĝigi kontraŭ la kruelaĵoj de niaj kontraŭuloj — la kapitalistoj.

Nia batalo estas ne nur por la ekzisto, sed ankaŭ por la konservo kaj evoluo de la prol. potenco. La diferencoj inter naciaj kaj la sennacieca asocioj estu regulotaj inter ni, sed tiuj kun la kontraŭulo — subpremantoj (kapitalismo — militarismo — eklezio) estu publike finluktataj. Ni devas nin defendi, por nia pozicio en la mondo. Por niaj prol. esp-istoj tiu batalo estas nepre necesa.

Nia Sennaciulo

volas esti ne nur konservata, sed ĉiam pli kaj pli evolucii. La ĉiam pli kaj pli kreskantaj, pli akriĝantaj antagonismoj sur politika kampo pretendas ĉiam pli — ankaŭ en spirita rilato — de ni prol. esp-istoj.

Se vi deziras veran vivecon kaj akran batalon, donu la (porekzist- kaj evolu-) eblecon, por povi zorgi por sanigo de tiu malsana epoko.

Sciu, karaj k-doj, ke ĉiu prol. esp-isto, kiu sin eltiras el tiu prol. esp-mondo, ne estas prol. esp-isto. Ni prol. esp-istoj garantias reciproke en politika kaj etika rilatoj.

Estas kelkaj en nia movado, kiuj, depost kiam ili estas esp-istoj, krom aliaj oferoj disponis aktive sian liberan tempon, eĉ pli, por la prol. esp-istaro. Kaj malgraŭ la proleta sorto, en kiu ili vivas kaj ofte malgraŭ manko de kompreno flanke de la gekdoj ili ne pentis tion. Tamen iam ili ankaŭ laciĝos kaj la malforto forprenos ilin el la vicoj de la kunbatalantoj. Ne estas grave. Tamen al vi karaj k-doj precipe en Germanio kaj Eŭropo ilia spita kaj insista vivo signifu por vi, ke vi per nenionfarado kaj neeluzo de viaj fortoj (ankaŭ financaj) katenigas la prol. esp-istan spiriton kaj kondamnas ĝin en musejon.

Kun ĉiu groŝo, kiun vi sendas en alian tendaron, vi plifortigas blinde la propran malamikon, kiu vin faligas al pereo. Se vi ne volas, ke ni mortu, ĉesu —, vi klopodu, nin kompreni kaj subteni abonante kaj varbante al "Sennaciulo". Ni volas konstante daŭrigi la disvastigon de sennacieca penso, por ke tiu mondo ne falu al la malvirto de tiu epoko.

SAT-ano 125.

Terlaboristo en mondrevolucio

Per ĉi artikolo mi intencas veki intereson inter k-doj pri terlaborista movado kaj pri speciala signifo kaj rolo de terlaboristoj en mondrevolucio. Estas pro tio interese aŭdi opiniojn el plej diversaj landoj, ĉar ĉie oni trovos ion specifikan, ion interesan.

Estas grava afero, ke per pliprogresinta tekniko defalas ankaŭ tiel nomita nacia sento kaj tradiciaĵoj. Samtempe kreskas sento de internacia solidareco. Psiko de fabriklaboristoj el ĉiuj landoj estas preskaŭ egala. Aŭ, ĝi nur malmulte diferenciĝas, ĉar vivo en unu karbminejo aŭ fabriko estas sama. Ĝi troviĝu ie ajn, homa penso dependas de cirkonstancoj, en kiuj ĝi troviĝas.

Ĉe terlaboristoj estas iomete aliel. Vilaĝo ne marŝas samrapide kun urbo, rilate la disvolviĝon. Ĝi ĉiam restas post la urbo. Dum urbo vivas en dudeka jarcento — vilaĝo kelkfoje vivas mezepoke. Speciale tio estas rimarkebla en t. n. agraraj landoj, ekz. sur Balkano. Tio estas unu el kaŭzoj, ke oni terkulturiston nomas konservativeman kaj kontraŭrevolucieman. Mi opinias, ke tio ne estas vera.

Terlaboristo, kompreneble, ne estas klaskonscia, li ne sentas tiun rektan kapitalistan ekspluatadon, sed li malgraŭ tio ne estas kontraŭ progreso. Ĉu terlaboristo estas kontraŭ novsciencaj eltrovaĵoj? Absolute ne. "Mia patro vivis tiel kaj mi mem ne deziras vivi per alia vivo", per tiu frazo oni ofte volas karakterizi vilaĝanojn. Tiu frazo estas malvera. Okazis ekzemple al mi, ke rakontante al unu simpla vilaĝano pri modernaj traktoroj (plug-motoroj). Kun entuziasmo li estis dirinta: "Eh! se mi nur povus tion vidi". Li petis de mi diversajn informojn pri moderna kampkulturado. Ni aldonu ankoraŭ grandan deziron de vilaĝanoj, sendi siajn filojn al studado. Per tio ni konvinkiĝos, ke terlaboristo malgraŭ sia situacio sopiras progreson.

Oni diras, ke terlaboristoj estas pli inklinaj al burĝa sistemo ol al komunisma. Tion oni volas pruvi per malgranda nombro da kom. partianoj en terlaboristaj rondoj. Je tio mi povas respondi, prenante kiel ekzemplon cirkonstancojn en Jugoslavio. (Mi opinias, ke en aliaj landoj estos simile). Ĉefa kaŭzo de tiu apatio estas neklereco. 75 procentoj da loĝantoj estas analfabetoj. Do propagando estas preskaŭ neebla pere de gazetaro. Ni bone scias, kian grandan rolon ludas gazetaro en mondrevolucio. Terlaboristoj estas izolitaj. Unika rimedo, per kiu ili rilatas kun urbo estas pastro kaj advokato, do homoj, kiuj estas kontraŭ revolucio. Krom tio "leĝo pri ŝtatdefendo" malpermesas ĉiun agitadon, se ĝi ne estas porŝtata. En urbo oni povas kontraŭleĝe labori (kvankam malfacile). En vilaĝoj tio estas absolute neebla. Ĝis la propagando kaj agitado estis libera, kom. partio havis fortan apogon inter terlaboristaro. Ankoraŭ ludas tre gravan rolon naciismo kiel sekvo de neklereco. Do, libera propagando kaj klereco, jen du gravaj punktoj, nepre bezonataj por revoluciigo de vilaĝo.

Kooperativismo estas kvazaŭ terlaborista ideologio. Burĝaro, bone sciante tion, volas per tiu metodo deflankigi revolucian senton kaj celon. Ili kreas kooperativojn dezirante ilin farigi ponton inter laboro kaj kapitalo.

Sed, oni devas bone distingi kooperativismon en burĝa kaj tiun en laborista socio. Lenin nin avertas en unu artikolo pri tio kaj diferencigas bone rolon de kooperativoj en burĝa kaj proleta socioj. Dum ili en burĝa socio estas kontraŭrevoluciaj en proleta ili estas produkto de proletaro mem, ili tie estas identaj kun komunismo.

Per ĉi-kelkaj punktoj mi volis pruvi revolucian emon de terlaboristoj kaj firmigi devizon:

"Ter- kaj fabriklaboristoj de l' tuta mondo unuiĝu!"

Bubo.

Jugoslava justeco

Du tagojn antaŭ Kristnasko sidis antaŭ burĝa juĝistaro du junaj k-doj: Franco Klopĉiĉ, studento de filozofio el Zagorje (Slovenio), ĉar li laŭ deziro de polico devus esti tiu sekreta kuriero, kiu alportis en Split unu kofron plena da propagandmaterialo dum lasta junulara ferdimanĉo, kaj Bruno Maudiĉ, 16 jara maŝinisto el Split (ankaŭ bona esperantisto) kiu estis kaptita en sama domo kie kuŝis tiu fatala kofro. Ili ambaŭ estas subfaligitaj sub § 1 ĉap. 1 n-o 1 de tiel fama "leĝo pri ŝtatdefendo" kaj kvar monatojn ili baraktis en karcero atendante punon de 20 jara malliberigo.

Sed laŭ faktoj ili estas pro tio tiom akre kulpigitaj: k-do Klopĉiĉ, ĉar li alveturis Spliton, ĉar li estas idealisto kaj ĉar li renkontis du ĝis tri laboristojn en unu urbo de 30 000 loĝantoj — kaj Maudiĉ ĉar li troviĝis en tiu malbenita domo. Ŝtata prokuroro kvankam havas nek unu fakton, ke Klopĉiĉ estas tiu kuriero alportinta kofron (kontraŭe ekzistas absoluta pruvo, ke li tiu kuriero ne estas) tamen li insistis plej teruran punon, kaj por k-do Maudiĉ por kiu li povus havi almenaŭ tian "fakton" ke li estis kaptita en sama domo kie troviĝis kofro li postulas pli malaltan punon.

Do, vi eksterlandaj k-doj povas bone juĝi pri niaj cirkonstancoj el tiu punkto, ke unu kiu riskas nur alveturi Spliton, esti idealisto kaj renkonti du ĝis tri laboristojn, estas tuj subfaligita sub § 1, ĉap. 1, n-o 1.

Finfine k-do Klopĉiĉ estas liberigita (sed retenita en karcero ĝis solvo de apelacio) kaj k-do Maudiĉ kondamnita je 10 monatoj de severa karcerigo.

Dua okazo:

5. jan. k-do Stefano Ĉaklec estas arestita nur pro tio, ĉar li ricevis unu leteron de sia korespondanto ruĝarmeano el Sovetio. Ankoraŭ li kuŝas en karcero (hodiaŭ estas 12) kiuj suferas teruraĵojn de senfina ekzamenado. *Jugoslava SAT-kor.*

"Ne elmigru el patrio!"

Kaŭze de sia malgrandeco kaj politiko de la registaro, regas en Estonio granda senlaboreco. Multegaj malsatantaj laboristoj, parte kun la familioj, parte soluloj, amase postlasas la "karan teron de l' patrio" kaj elmigras al ĉiuj direktoj de la mondo. Plejparte oni elmigras al Ameriko, nome al Brazilio. La elmigrado atingis maksimumon antaŭ kelkaj monatoj, kiam ĉiusemajne centoj da laboristoj kun la familioj elmigris tien.

Sed pro kompreneblaj kaŭzoj la burĝaro ne povis tion toleri. En la gazetaro estis dediĉitaj longaj artikoloj al la elmigrado. Tion oni riproĉis al la registaro, kial ĝi ne malpermesas elmigradon el Estonio. Oni devas tion malpermesi ktp.! Krome ankoraŭ aperis speciale por la elmigrontoj teruro-timigaj artikoloj pri Brazilio kaj ĝiaj serpentegoj, kiuj ĉiumo.

mente englutas centojn da homoj. Laŭ la artikoloj ŝajnis, ke eĉ unu kvadratfuto de tero ne estas tie sen serpentegoj.

Per iaj rimedoj oni ja devas haltigi la elmigradon! La sekvoj de l' artikoloj, postulantaj malpermesi elmigradon, tuj sentiĝis. Ministro por internaj aferoj *malpermesis* elmigradon al Brazilio. Ankaŭ al aliaj landoj estas nun pli malfacile elmigri. En la gazetaro oni klarigis, ke ne estas malpermesite elmigri, sed oni nur ne ricevas por tio permeson kaj eksterlandan legitimilon. Nu, kiamaniere oni elmigru el nunaj landlimoj, se la regantoj ne donas por tio permeson? Vera idioteco?

Kaj ĉu oni elmigras senkaŭze? Certe ne! Se oni ne povas ricevi laboron en la "kara patrio" kaj kie laboristojn atendas longedaŭra malsatmorto oni estas devigataj serĉi pli bonajn vivrimedojn, ĉu pere de elmigrado aŭ per io alia.

Sed ne estas eble plu elmigri!

Kaj kion la burĝaro intencas fari per la senlaboruloj? Ĝi volas ilin eklaborigi en marĉoj per kulturiga laboro, kiu verŝajne okazos post kelkaj jaroj. Sed kion la senlaboruloj faras dume? Malsatu! Ĉiuj fabrikoj iom post iom ĉesas labori kaj nombro de senlaboruloj kreskas ĉiutage. Kvankam oni kelkajn centojn sendas al komunumaj laboroj, tamen tio ne forigas la ĉiutage kreskantan senlaborecon. Oni malsatu, sed ne elmigru! Kaj la burĝa ideologio ja estas tia: Ĉu en patrio atendu vin morto aŭ malsato, ne elmigru el ĝi, ĉar ĉi tie morti kaj malsati estas pli noble kaj honore ol labori en fremda lando!

Je — jes! Sed ĉu tiuj malsatantoj mortontaj ne iĝas danĝeraj por la "kara patrio" kaj ĝin iam renversos?

Inferano.

Mizero de infanoj

Se oni konstatus tion pri Sovetrusio certe jam ĉiuj burĝaj jurnaloj estus skribintaj longajn raportojn pri tio. Sed la afero rilatas Ĉekoslovakion, kaj tial — Silenton! La ĉek. revuo "Morava" publikigas okulfrapantajn argumentojn pri la mizero de infanoj el la ĉekosl. lernejoj. La skribanto, Mat. D-ro kaj Ph. D-ro V. Suka, profesoro de la Masaryk-Universitato en Brno (Brünn) raportas jenon:

"Antaŭ mi staris knabinetoj en longaj vicoj unu apud alia kiel mi konstatis 10 kaj 11 jaraj, plej parte preskaŭ skeletoj kovritaj per haŭto kaj tiu haŭto estis tiom malpura, ke la malpuraĵo kvazaŭ haŭto deŝeliĝis, kun longaj haroj kungluitaj kaj plenplenaj de pedikoj, kiuj nur tiel falis el la haroj. La piedetoj estis nigraj, kvazaŭ ŝtrumpo-simile, kaj la ungetoj de ĉiuj 20 fingroj estis misornamitaj per signo de malpureco. Kaj la tuta haŭto de ilia korpo estis kovrita per makuloj postlasitaj de homaj fiinsektoj ĉiuspecaj. — — — Jen bildo de la ĉekosl. knabinoj el 1925 jaro de la ĉekosl. lernejoj. — — — 79% malpuraj, 60% pedikaj kaj 20% puraj.

Tio estas la proletaj infanoj, kies gepatroj devas de frua mateno ĝis malfrua vespero laboregi por gajni kelkajn monerojn kaj almenaŭ savi la nudan vivon de siaj idoj. — Kie ili prenu la tempon por flegado kaj edukado? Kaj ofte eĉ por aĉeti pecon de sapo mankas la mono. — — —

Tion la burĝaj infanoj ne konas, ili ĝuas komforton, havas edukistinon kaj tiel plu. Ili venas en lernejon kun plenaj poŝoj de plej bonaj manĝaĵoj, pudrigitaj, en silkaj kostumoj, kun fingr- kaj orringoj ornamitaj, parfumigitaj, kaj nenio tute nenio al tiuj infanoj mankas malgraŭ iliaj gepatroj ne laboras. Kaj ĉi ĉion devas la proletaj infanoj silente piririgardi. Tio estas la klasa abismo. Infanoj proletaj komprenu ĝin!!"

(409)

Peta alvoko el "Libera urbo Danzig"

Karaj gekamaradoj tutmondaj. Per malmultaj linioj mi volas vin atentigi je nia malgranda ŝtato Danzig, la zorginfano de la ligo de nacioj. En ĝi pli kaj pli ampleksas la senlaboreco. Unu fabriko post la alia fermas siajn pordojn. Bankrotiĝas malgrandaj entreprenoj. La albordiĝo de fremdlandaj ŝipoj pli kaj pli maloftiĝis. La tuta iam vigla movado de la haveno dormas, ĉar ankaŭ novinstalo de alia haveno apud Danzig estis kaj kolpremas tiun tiel prizorgatan priparolatan kreaĵon de bonintenco, de internacia kapitalismo. La menciata kaj aliaj okazoj similaj estas la kaŭzo, ke tago post tago pli da gelaboristoj estas maldungataj. Kaj tiu nombro kreskis dum la lastaj monatoj je alto de 25000, se ankaŭ la statistiko oficiala tiun nombron ne volas konfirmi. Kies verko estas tia okazo, mi pensas ne estas necese mencii. Preskaŭ nur triono el ni mizeruloj ricevas ŝtatan subtenon. Imageble nur tre malaltan. Pro malsato granda parto el ni nur skeletsimilas. Kaj tamen estas necese vicstari, por tiuj malmultaj pfenigoj, batali tagojn post tagoj en malvarmaj de vento trablovataj koridoroj. Aliloke ankoraŭ unufoje po centoj en 4 metroj kvadrata ĉambro stari kaj eluzi la lastajn ĉifonaĵojn. Vomo kaj sveno ne estas maloftaĵo.

La encirklado, novlimigado de Danzig pretendis konklude novajn oficistojn, kaj ili sennombre elkreskis el la tero kaj ĉiuj devas esti pagataj. Do la plej bona, preskaŭ ĉiuj du havas superulon, kaj tiuj ricevas sonĝaltajn salajrojn, kiuj varias inter 1000 ĝis 5000 pomonate laŭ Danziga guldeno. Laboristo kontraŭe, kiu perlaboras al ili la monon devas esti kontenta kun 30 ĝis 50 posemajne. Ĉu diferencas la unu de la alia? Sed ni estas fidelaj laborbestoj kaj ili estas bonvestataj, do pli bonaj, pli noblaj estaĵoj ol ni, ĉu ne? Ni do devas klini antaŭ ili. Kaj en vero ili naskiĝis ĵus tiel nudaj kiel ni, nur kutimiĝis ili komandi kaj ni obei.

Sed kamaradoj nun venas la plej bona. Por ke ĉi tiuj senzorguloj ankaŭ pluen, ricevu ĉi tiun monon el niaj ostoj suĉata elpremata, proklamas la senato, ni devas malaltigi la subtenon kun la aserto, la klarigo, la senlaboruloj prenas tro multon el la ŝtata kaso kaj tio, nur tio estas aŭ estos la kaŭzo, se la ŝtato ruiniĝos. Do per ĉiu ajn rimedo ili provas nei la subtenon. Sur la kampo en la ĉirkaŭaĵo de iama urbo Danzig devas la plej multon suferi la kamparano.

Kaj tie ankaŭ komencis la senato unue pagi oficiale la neleĝan subtenon. Nur ekkonis kelkaj kuraĝuloj la danĝeron kaj redaktis, eldonis la protestilon publikan "Der Erwerbslose" ("La senlaborulo"). En ĉi tiu gazeto estis publikigata la mizero de urbo kaj kampo. Kaj vidu jam la duan numeron malpermesis la senato, ĉar ĝi entenis alvokon al ĉiuj senlaboruloj, protesti kontraŭ la intenco de la senato, tute ĉesi la pagon de la subteno komence de februaro. Ni nur eksciis tion per persono kompetenta, kiu senpripense parolis pri tio. Kelkajn senlaborulojn oni arestis kaj la redaktoron oni serĉas. Sed plue ni laboras kaj varme ni petas per ĉi tiuj linioj la tutmondajn helpemajn gekunulojn informi nin pri la senlaboreco tie kaj sub kiuj kondiĉoj vivas niaj senlaboraj fratoj en aliaj mondpartoj. Ni estus tre dankaj, se ni el laboristaj manoj ricevus tiajn informojn, ĉar la oficialaj ja ne koincidas kun la veraj.

Koko 2421.

Stato de senlaborularo en Bavario

La nuna ekonomia krizo senlaborigis dekmilojn da laboristoj en nia lando. Oni povus kredi, ke nun la ŝtato zorgus por ili. Sed jenaj linioj montru al la SATanaro tutmonda, kiamaniere ĝi plenumas tiun taskon. Mi kredas, ke, se mi rakontas pri mia propra sorto, mi plej bone povas respeguligi la vivon de la senlaboruloj ĝenerale.

Estante fraŭlo 26jara mi ĝis nun ricevis subvencion ŝtatan, posemajne 9.10 mk. Tio estas, ke mi per tiu mono devis havigi al mi ĉiujn vivnecesaĵojn. Ĉu tio estas ebla? Se mi ne estus ricevinta ankoraŭ 5.— mk. flanke de mia profunuiĝo kaj krom tio subtenon nutran de miaj gepatroj, mi certe jam de longe troviĝus inter kvar muroj t. e. en malliberejo. Sed, oni ne opiniu, ke la ŝtato malavare donas al ni tian "grandiozan" helpon. Ĝi nun sendas nin al tiel nomataj "laboroj dum mizero" (Notstandsarbeit). Kiel oni traktas nin tie, pruvu la jena ekzemplo. Mi, loĝante en Dachau estas sendita al tia laborejo al Indersdorf (17 kilometrojn malproksime de Dachau), por elfosi riverujon. Oni pagas al ni pohore 0.55 mk. Pro diversaj cirkonstancoj ni po semajno nur povas labori 37 ½ horojn (malbona veturebleco) tio signifas, ke ni laborante la tutan semajnon perlaboras 20.63 mk. Sed de tiu sumo oni dekalkulas al ni 1.62 mk. por malsanasekuro 0.50 mk. por invalidec-

asekuro kaj *imposton*. Krom tio oni al ni ne volas rekompensi eĉ la veturkostojn posemajne 2.20 mk. Do oni enmanigas al ni 16.31 mk. Nun ankaŭ ni perdas memkompreneble la sindikatan subvencion. T.e. ke estante senlaborulo nenian laboron farante oni ricevas posemajne 9.10 mk. kaj 5.— mk. estas 14.10 mk. laborante 16.31 mk. Do, pro 2.11 mk. oni devas esti la tutan semajnon dum tia malvarma vetero ekstere kaj devas laboradi. Do, ni esperu, ke ĉi tiun mizeron forigu la laboristaro tutgermania. La 16. jan. estis parolonta k-do Freiberger en Dachau pri liaj impresoj kiel membro de la germana delegacio lab. en Sovetio. Bedaŭrinde la polico malpermis, ke li parolu ĉi tie. La laboristmasoj ĉagrene forlasis pro tio la kunvenejon. *SAT-ano 4204.*

El germana lernejo por policistoj

Kiel en Germanio oni agas en ŝtata policista lernejo, tion vi legos en la sekvontaj linioj. Ne forgesu, ke Germanio estas "Libera Respubliko". — En Frankenstein (Silezio) ekzistas "belega stato" depost kelkaj jaroj! 1. Ĉiuj inoj ne havas permeson, laborante en kuirejo, kunporti manĝaĵ-restaĵon hejmen. Kiu ne obeas, estas tuj maldungata! Virino, doninte restaĵon al malriĉa laboristo, estis punita tiamaniere. — Do, aŭskultu k-doj! Oni vendas la restaĵojn al riĉa posedanto (lakt-komercisto) en vilaĝo. Tiu-ĉi homo pagas po unu porcio da manĝaĵo: unu pfg. (0,01 mk. g.) kaj nutradas la porkojn per ĝi. — En la sama urbo estas ankaŭ 250 senlaboruloj, kiuj dezirus tiajn manĝaĵrestaĵojn. Volonte ili pagus po unu porcio 0,10 mk. g. — Sed, pli volonte oni vendas ĝin kiel nutraĵon por porkoj! Kaj la viando de la porkoj kostas same, kiel en alia loko! — — 2. Je la "Sankta Vespero" la inaj "labor-maŝinoj" ricevis malgrandan kukon kiel "rekompencon por plilaboro dum la jaro 1925"! — — Tiamaniere oni "pagas" en Germanio. K-doj! Jen ekzemplo, ke porko havas pli grandan valoron, ol laboristino. Same ĉie la kapitalistoj ekspluatas nin. K-doj! Per nia SAT-movado ni *povas* montri, kiom multe da laboruloj laboras, sen sciiĝi, ke ili ankaŭ estas *homoj!* Ni *volas* montri, ke nur kunlaborado per unu lingvo ebligas la venkon super la aro da vampiroj (kapitalistoj en ĉiuj landoj)! *(1851.)*

Kion aŭdu ĉiu proleto

En la lastaj kongresoj de l' gvidanta politika partio de Sovetlando (Komunista Partio Tutunia) la plej respondaj kamaradoj (Rikov, Stalin) laŭte proklamis, ke *la soveta regno tuj estas preta ne sole nuligi la armeon, sed eĉ tuj ĉesigi ĉian produktadon pormilitan* (ĉiun milit-industrion). Kompreneble, la kondiĉo estas, ke *ĉiuj landoj konsentas la samon.*

Ĉar la burĝa kaj duonburĝa gazetaro, detale priskribante la kongresojn, tute prisilentas ĉi gravegan aferon, ni aŭdigu ĝin al ĉiu proleto per nia tutmonda ĵurnalo. Ne helpos al burĝaro ĝia malbona silento, kiel ne helpis antaŭe ĝiaj "bonaj mensogoj" pro Sovetio, unu malaperintaj post raportoj de delegacioj diverslandaj!

Proletoj, aŭdu kaj subtenu la pacajn proponojn de l' registaro laborist-kamparana! Viglaj SAT-anoj, rondirigu ĉi-informon, kiu estu liberiga kanto kaj batala himno por ĉiu! Sciigu ĝin al ĉiu kamarado, esperantisto kaj neesperantisto, sendepende de liaj partiaj tendencoj. Enpenetrigu ĝin en la tutan gazetaron laboristan, kien ĝi ial ĝis nun ne penetris!

Organizu la opinion laboristan ĉirkaŭ ĉi komunikaĵo. Superŝutu la registaron sovetan per viaj esprimoj de simpatio kontraŭ tiu propono — estas, sendube grandega morala subteno por ĝi — kaj, sekve, grandega apogilo por la paca afero.

Ĉu ni, SAT-anoj, ne devas batali por la paco? Kaj ĉu ne estus jen bona okazo por nia agado?

Ekbatalu pacemuloj veraj! *5251*

Agitado kontraŭ submarinoj

Katastrofo, okazinta antaŭ nelonge al submarino "M. 1", tiom skuis publikan opinion de Anglio, ke oni alvokas internacie interkonsenti pri absoluta malpermeso konstrui kaj uzi submarinojn. Agitado de angla gazetaro trovas favoran resonon ĉe usonaj gazetoj, kiu rememorigas ke dum Washington'a konferenco Britio kaj Usono estus rezignintaj pri apliko de l' submarinoj, se nekontraŭstaro de Francio.

Estas notinde ke, komentante anglan proponon, la "New-York World" skribas: "sendube subakvigo de pasaĝeraj ŝipoj estas krima, sed neniel blokado kaj malsatigo de tutaj nacioj, celanta ilian kapitulacon, estas malpli krima. Anglio, se ĝi faras sian proponon serioze, devas rezigni ankaŭ pri batalilo, per kiu ĝi povas blokadi kontinentajn landojn!"

Nu, kie do estis la homaranoj dum furiozinta hombuĉado? Ĉu oni sampredikos ĉe l' eksplodo de nova milito? Dubinde, ĉar tio estas . . . malpatriotece! *(1929)*

VIa Laborista-Esperanto-Kongreso por la germanlingvaj regionoj

La 2.—5. aprilo (pasko) 1926 okazos en Stuttgart, Gewerkschaftskaus (sindikatejo) Esslinger Str. 19, la VIa Kongreso de Laborista Esperanto - Asocio por la germanlingvaj regionoj. Okazos Esperanta-ekspozicio kaj propaganda kunveno ktp.

Ĉiuj gek-doj eksterlandaj, kiuj restados dum tiu tempo en Germanio aŭ intencos veni ĉi-tien ni invitas partopreni nian kongreson. Partoprenontoj anoncu sian adreson al k-do *A. Just,* Stuttgart, Hohenheimer Str. 54a (Germ.). Ni salutas vin.

FEMINISMO

Virino en Perslando

Apud urbo Reŝt vaste dislokiĝis rizaj kampoj. Sub varmega suno de Persio bonege kreskas rizaj kaŭloj. Maturiĝas ili por mizera nutrado de kamparano. Preparas riĉan vivon al bienposedantoj. Bezonas por rizo sunon kaj malsekecon. Suno senkompate bruligas tiujn, kiuj kulturigas rizon. Malsekeco naskas malsanon — malarion. Kaj febrigas kruele malario tiujn, kiuj dum sunleviĝo rapidas kamparojn, kiuj dum luna nokto rikoltas rizon kaj ligas ĝin je garboj.

Kaj kiam pluvas, alfleksante la kaŭlojn teren, rompante ilin — minacas malbona rikolto. Kaj sur vilaĝaj vojoj, riveretoj kaj kotakvoj en multkoloraj vestoj, per nudaj piedoj tiam rapidas kamparojn persaj kamparaninoj. En iliaj okuloj sin kaŝas timo. Ho, se ĉiuj spikoj ekromiĝos, pereos multe da rizo. Ja, nedifektitan parton de rikolto prenos bienposedanto, kiel imposton. Kaj malsata vintro devigos fleksi dorson je metia laboro por urba bazaro. Malsataj infanoj estos plorantaj kaj petantaj pilav'on.[1]) La edzo estos kolera. Li mem en lagoj kaptados fiŝojn, sed pli grandan parton de lia fiŝkaptaĵo prenos ankaŭ bienposedanto.

Per silka brilo brilas desegnoj sur persaj tapiŝoj en luksaj salonegoj de Parizo, Londono, Berlino, Nov-Jorko. Larmojdiamantoj el blindiĝintaj okuloj, lertaj sekiĝintaj fingroj de persaj metiistinoj disdesegnis centojn kaj milojn da tiaj tapiŝoj. Por 40 kopekoj dum tago, laborante ne laŭ horloĝo, sed laŭ suno, ĉe mastro-akaparisto en metiejo kuniĝinte po 25—30 virinoj. Ili blindiĝas kaj konsumiĝas je tapiŝoj pro tio, ke edzo, patro kaj pli aĝa frato vendis ilin por ĉi laboro, pro tio, ke mastroj-akaparistoj ricevas grandajn profitojn de amatoroj de persaj tapiŝoj.

Dronas en floroj kaj fruktarboj urbo Reŝt. Rifuĝas en ĝi etaj kabanoj de metiistoj-duonproletoj. Plilarĝiĝas en urbo konstruaĵoj de magazenoj kaj komercaj kontoroj. Aparte, je fiera izoleco, staras domo de bienposedanto. Ĉirkaŭita per alta barilo ĝi kaŝas ion de fremdaj enviemaj okuloj. Nur luno ne unu fojon vidis kiel fraŭlino-duoninfano kisis piedojn de kaduka maljunulo-bienposedanto. Kaj vento aŭdas plendojn-preĝojn de fermitulinoj al Granda Alaho pri maldolĉa sorto de sklavinoj. De rizaj kamparoj, de vilaĝo prenis ilin bienposedanto por sia amuzado, trosatiĝis per ili kaj nun tenas kiel servistinojn. Mem li edziĝis je fiera nobelino. Li amos eŭropan aventuristinon. Multe da mono elspezas bienposedanto. Multon kostas haremo, servistaro kaj eŭropan "amatino".

---

[1]) pilav = riza kaĉo kun viando, precipe kun ŝafaĵo.

Jen, se li estos bankrotinta, li ekvendos ĉiujn siajn vilaĝojn kune kun kamparanoj. Ne dezirante doni al centra registaro parton de kolektitaj vilaĝanoj impostoj, li komencas militon kun centra registaro. Li prenas laborantajn manojn de laboro en kamparoj, kaj virinoj, maljunuloj kaj infanoj tiam tropenados je laboro.

En Ĥamadan estas nafto. Posedas ĝin angloj. 35 000 laboristoj estas okupitaj en anglo-persa nafta industrio. Pro rublo dum tago ili laboras 10—12 horojn. Rublo dum tago donas al persa laboristo ekzistadon de almozulo-duonsklavo. Lia edzino laboras ĉe akaparisto en deponejo. Liaj infanoj de matenruĝo ĝis sunsubiro malpuraj, nudaj, malsataj, baraktas, petolas, sur stratoj kaj gardas ilin nur sorto . . .

Kaj en tuta Persio —, en lando de rizo, floroj kaj nafto, — oni kalkulas, estas 100 000 veraj proletoj, 100 000 proletaj familioj.

Ne ĉiuj persinoj estas kovritaj per ĉadroj,[2]) sed ĉiuj ili estas senrajtaj . . .

Vilaĝanino en mallonga jupo, kun nudaj piedoj, kun ĉiam elfalantaj el sub tuko nigraj harligoj laboras sur kamparoj . . .

En urboj metiistinoj vestas ĉadrojn kaj ne kuraĝas sur strato malkovri vizaĝon, ĉar ili estos arestitaj de policano . . .

Edzinoj de komercistoj, aristokratoj, inteligentuloj kaj pastraro preskaŭ ne eliras stratojn de urbo. Elirante dum monato 1—2 fojojn ili sin kovras de kapo ĝis piedoj per ĉadro, per reto el ĉevalaj haroj.

Ne ĉiuj persoj havas kelkajn edzinojn, sed ĉiuj ili rajtas tion . . .

Malriĉulo — kamparano, metiisto, dunglaboristo, malaltranga oficisto, malriĉa instruisto — ili ne havas monon por aĉeti pli ol unu edzinon . . . (Daŭrigota)

[2]) ĉadro = vizaĝkovrilo, kiun vestas virinoj en Oriento por kaŝi sian vizaĝon kontraŭ rigardoj de fremdaj viroj.

≡ DISKUTEJO ≡

Frontunueco aŭ vera klasbatalo

Koncerne la artikolon: "Al ĉiuj sinceraj unuecfrontanoj"

Frontunueco en SAT? Ja jen estas la demando koncernanta la plej larĝan terenon! Kiam foje mi ektuŝas la aferon de tutproleta agado, ĉiam aperiĝas kiel ulcerigita vundo la duonigo de tutproletaj opinioj pri la taktiko. Ĉu nur nune? Ne! Tio daŭras dekojn da jaroj. Jene — unuflanke Marks kaj Engels kaj duaflanke Lasalle, Proudhon k. a. Vere! Oni devis antaŭvidi tiun ĉi krizon jam en momento, kiam SAT estis aranĝita. Difini la celojn de SAT kiel realan proletan agadon kaj fidi pri la kunlaborado de ĉiuj proletaj direktoj — ĉu jen ne estas la kontraŭdiro en premisoj? SAT povus fariĝi la tutproletara kaj eĉ la tuthomara organizaĵo, se ĝi limigus sian laboron al la lingvosciencaj ktp. demandoj. Tamen la proletaro estas la aĵo koncize kunigita kun la ekonomiaj aferoj, ĝi ne povas flugpendi en aero de abstraktaj ideoj. Maleblas entute priparoli la proletajn aferojn ne turnante sin en sfero de laborad- kaj produktadkondiĉoj, de senlaboreco, de politikaj kaj kulturaj cirkonstancoj de laborista vivo, de kapitalismaj malbonuzoj, blanka teroro ktp. de efektiviĝanta en niaj okuloj socialisma sociordo. — Maleblas escepti de priparolado iujn regnojn kaj popolojn. Kaj tamen, ni eniras en tiun ĉi sferon, ĉu ni povas eviti tiun fatalan dilemon: evolucio aŭ revolucio, oportunismo aŭ senindulgismo, senfina atendado por proleta liberigo aŭ frua atingo de idealo per ekstrema fortojstreĉo? La unuaj kaj la duaj disopinias pri la ebleco de frua revolucio, pri la valoro de demokratio, de parlamentarismo, de ĝenerala voĉdonrajto, pri la kunlaboro kun la burĝoj ktp. — ne estas eĉ unu demando pri kiu ili konsentus. Kiu el la proletaj agantoj jam de longe ne estis elpreninta la duan vojon, ni estu certaj, ke li ĝin ne elprenos ankaŭ en SAT, ne nur ne elprenos, sed eĉ ne toleros; li SAT-on forlasos. Ĉu vi scias kion diras la socialismanoj en landoj kie socialismo aliancita kun la burĝaro savas, sanigas la kapitalisman regnon? Jen ekzemple tiel: "Blanka teroro en nia lando? — Jeno estas malnobla mensogo!" Aŭ: "Ĉio bona, nur ne diru al ni pri Sovetrusio!" Ĉu en ĉiu lando ne troviĝas tiuj socialismanoj? Se "Sennaciulo" estos kiel ĝis nun vere "Esp-o je la servo de l' tutmonda proletaro", se ĝi brulstampigos la blankan teroron, se ĝi priskribos senantaŭjuĝe la novan proletan vivon en Sovet-Rusio, tiam ĝi estos prijuĝita de deciditaj "ministraj socialismanoj" kiaj mensogo kaj sensenco. Kaj inter la nedeciditaj estos SAT kontraŭbatalita de la deciditaj. El tuta numero de "Senn." ili toleros la malgravaĵon: "Originala fiŝo de la lago Bajkal", aŭ la humoraĵon: "La ĉevalvetkurado", do ĉion juste, kio estas forigebla el "Senn." Do kien? Ni estu elprenendaj: SAT unuecfronta, senseksa, lingvoscience-proleta organizaĵo, aŭ SAT unudirekta revoluciema proleta batalanto?! Tamen! Por ke mi ne estu malbone komprenita! Mi tute ne konsilas, ke iu estu ĉe SAT malinvitata. Nia malamiko — kapitalismo — estas unu fortikaĵo. Ni streĉu ĝis la ekstrema limo nian cedemon, por ke ni ebligu kunlaboron al la plej granda plimulto de proletoj! Tamen SAT ne kuraĝiĝu foriri el la platformo de revolucia batalo! Tamen "Senn." ne kuraĝiĝu malakirigi sian plumon! Tiel farante ĝi fariĝus "neŭtralulo". Kiu estas sincera proleta frato, tiu-ĉi ne foriros, li aliĝos nian batalantan revolucieman SAT-on.

Katilina.

Ankoraŭ pri malsanoj

Mi ŝuldas respondon al k-do N. Ŝtankovskij ("Senn." n-o 63). Li, kaj eble multaj aliaj, verŝajne ne komprenis min. Se mi havas en mia domo mil kilogramojn da pulvo kaj iu ĵetas en ĝin brulantan alumeton, la tuta domo forbloviĝos. Kio kaŭzas tian grandan efikon? La alumeto aŭ la pulvo? Certe ambaŭ estis necesaj, sed mi konsideras la pulvon esti la plej danĝera kaŭzo. Same malvarmiĝo aŭ baciloj, *kune kun la kulturo en kiu ili vivas,* povas okazigi malbonfarton, sed nepre nur en antaŭe jam malsana putranta korpo.

Ekzistas nur unu vera malsano, la toksemio, aŭ malbona sango, kaŭzata de malbona manĝado. La t. n. malsanoj estas nur simptomoj, malsamaj laŭ la parto de la korpo en kiu ili montriĝas, laŭ la fortеco de la malsano, la aĝo de la ensanga veneno, kaj fine laŭ la pasintaj spertoj de la malsanulo. La t. n. malsanoj estas eligo de la venenoj amasiĝintaj en la korpo. Do ili estas ne timindaj, kiel mi diris en mia antaŭa artikolo pri la variolo. Sed la homoj timas ilin kiel infanoj malofte sin banantaj timas la akvon.

K-do Ŝ. volas konsenti, ke nur la malsanoj de la digesta organaro estas kaŭzataj de malbona manĝaĵo aŭ manĝado. Ĝenerale tiaj malsanoj estas la unuaj kiuj atakas nin: en Usono la infanoj malsaniĝas de ili jam en siaj unuaj jaroj. Sed tiuj malsanoj estas sisteme subpremataj de la kuracistoj, ĉu per drogoj, ĉu per daŭrigo de la malbona manĝaĵo, ĝis la venenoj de la intestoj estas disvastigitaj tra la tuta korpo. Tiam povas okazi aliaj malsanoj, ne digestaj. Ĉe la infanoj okazas ĝenerale la erupciaj malsanoj, morbilo, skarlatino, variolo. Se oni subpremas ilin, la veneno ne povas eliri kaj restas en la korpo por pli forte erupcii iom pli poste kiel alia malsano. Pro tio mi skribis, ke la variolo estas tute netiminda: oni bezonas nur lasi ĝin "iri sian vojon", t. e. lasi la venenojn bone eliri. Oni povas helpi ilin eliri per ŝvitbanoj, per teo de tilio aŭ sambuko, sed ne malhelpi per drogoj kaj vakcinado. Homo, kiu zorgas pri la elimino de venenoj el la korpo, ĉu per ŝvitrimedoj, ĉu per bonaj renoj kaj regula defekado, ĉu fine per nesubpremo de la malforta facilaj malsanoj (malvarmumoj, febroj, k. a.), per kiuj la korpo emas elĵeti la venenojn, tia homo estas ĉiam imuna kontraŭ la t. n. infektaj malsanoj. Vakcinado kaj antitoksinoj ne faras lin pli imuna, tute kontraŭe.

Mi ne neas, ke malsano t. n. infekta povas iafoje esti inokulata, sed memoru, ke ĉiuj sanaj homoj estas imunaj al tio, ĉar la baciloj ne trovas en ili la bezonatan nutraĵon. Ĉar la nutraĵo de baciloj kaj bakterioj estas putrintaj substancoj, kiu devenas de malbona manĝaĵo aŭ troa manĝado. Cetere, kion signifas inokulado de infekta malsano? Ĝi signifas, ke oni semas en bone preparita tero iun

semon kune kun konvena sterko — ĉar la baciloj ne estas inokulataj puraj sed kun iliaj kulturoj, tio estas fluidaĵo en kiu ili vivas, kaj kiu enhavas nutraĵon por la baciloj kaj la ekskrementojn. Kompreneble oni rajtas atendi rikolton. Sed vi semu tritikon en la sablaĵoj de Saharo, kaj kion vi rikoltos? Sana korpo estas por baciloj kiel la Saharo por tritiko.

En malsana korpo la baciloj ludas certan rolon sed ne la rolon de kaŭzantoj. Ili estas helpantoj, kiuj fluidigas la mukajn kaj malfluidajn venenojn kaj ebligas, ke ili eliru. Kompreneble tia ĝenerala purigo ne estas agrabla. Same al porko estas malagrable, kiam oni purigas lian dormejon, speciale se oni malofte purigas ĝin kaj lasas multe da sterko kolektiĝi. Kion vi pensas pri porko, kiu elpensas geniajn rimedojn por malhelpi, ke la homoj venu por sensterkigi ĝian loĝejon? La homo kiu volas kuraci malsanojn, t. e. malhelpi ilian naturan evoluon, ne agas pli saĝe ol tia porko.

Mi studis sufiĉe la bakteriologion patologian. Eble eĉ tro multe. Ĉar ŝajnas, ke la tuta afero estas falsaĵoj. Kiam la fama bakteriologo Koch venis el Azio kun la bacilo de ĥolero, malkonsentis kun li lia kolego, D-ro Klein. La lasta tute trankvile englutis tutan vinglason da comma-bacillus kaj li ne malsaniĝis. Same iu s-ro Tresh trinkis plenan akvoglason da difteribaciloj, pensante, ke ĝi estas akvo, sen malbona sekvo. La kompanio Goldsmith en Londono antaŭ multe da jaroj oferis mil funtojn sterlingajn por specimeno de variolo-bacilo. Neniu ĝis nun postulis la sumon! (Vidu art. pri kanceresploro en "The Contemporary Review". okt. 1925).

Mi scias, ke multaj medicinistoj, bakteriologoj, patologoj, k. a. studas la kaŭzojn de malsanoj, sed ili preskaŭ ĉiuj estas sur malĝusta vojo. Kelkaj jes trovas la veron, sed ili estas senprokraste eksigataj el la medicinaj asocioj, maldungataj de la universitatoj, mokataj, poste eĉ persekutataj de la oficiala akademia scienco, kiu ne deziras novaĵon malaprobatan de la plimulto. Sed ili forgesas, ke multaj ideoj nun akceptataj estis unue mokataj. Kaj kontraŭe, la "sciencaj rimedoj" antaŭcentjaraj estas nun preskaŭ forgesitaj. Unu el ili estis la sangellaso: ĝi estis barbare praktikata en la 18a jarcento, nun ne.

Multaj homoj studas nuntempe science, ne metafizike, la kaŭzojn de malsano. Kaj ili pruvas siajn asertojn per sia propra sano kaj la sano de siaj amikoj. La samon mi klopodas fari. Sed ne nomu la rezultatojn tiel akiritajn "fantaziaĵoj".

Dum mi maŝinskribis la supron alvenis "Senn." n-o 64 kun artikolo de "Tallinnano". Lin mi malmulte povas riproĉi: ŝajnas, ke li sufiĉe bone sin nutras, per fruktoj kaj verdaĵoj, sekala pano, grioj, terpomoj, butero, iom da lakto, k. a. Tute ne riproĉinda. Mi neniam diris, ke oni tute ne manĝu amelon kaj proteinon. Mi diris, ke homoj malsaniĝas, ĉar ili manĝas "tro multe" da ili, kaj ke ili devus malpliigi iom la kvanton, kaj pliigi la kvanton de fruktoj kaj verdaĵoj. Sed blanka pano, polurita rizo, kuiritaj terpomoj estas preskaŭ pura amelo. Kial oni ne povas manĝi aliajn aferojn? Nigra pano ankaŭ enhavas amelon sed ankaŭ mineralojn, kaj pro tio ĝi estas pli bona. La kamarado el Tallinn ne kredu, ke mi manĝas ok kilogramojn da brasiko. Tamen mi vidis homojn fari aferojn multe pli malsaĝajn. Ili manĝis unu kilon da viando, unu kilon da pano, kaj trinkis ĉirkaŭ dek kilojn da akvo. Kiuj kune pezas 12 kilogramojn! Ĉu tio ne estas troŝarĝigo de la stomako?

Tallinnano eble manĝas 3000 mil kaloriojn potage anstataŭ 2500, ĉar li diras, ke li en aŭtuno havas nazkataron. Nu, mi antaŭe havis tian regule ĉiuaŭtune, nun ne. Kial? Ĉar mi scias la kaŭzon kaj mi evitas ĝin. *Karl Fröding* (Rockford).

≡ DIVERSAĴOJ ≡

Sennaciulo kiel amiko

Por montri al niaj k-doj per kiu sopiro kaj maltrankvilo oni atendas "Senn." en la terorlandoj, ni ĉi sube publikigas leteron, kiun ricevis la administracio. Tiu letero ne estas la sola, ofte ni ricevas tiajn ĝojesprimojn.

Karega k-do! Via letero kune kun la membrokarto de k-dino .... atingis nin. Ĝi alportis por mi ĝojon kaj estis vera trankviligilo pri miaj pli antaŭaj sendaĵoj al vi. "Senn." kaj "S. R." (sen kovrilo) ni konstante ricevadas. Ni, ĉi tieaj SAT-anoj akceptas la jam menciitajn gazetojn per tremantaj pro ĝojo manoj; ni estas avidaj al ili "kiel infanet' al mampintoj", ĉar ili donas vere freŝigan nutraĵon por la spirito kaj tio okazas nun, kiam ni devas vire kontraŭstari la sufok-venenigan atmosferon de figazetaro en nia lando, nun — kiam ni briletas pro manko da aero pura. —

Konsiderante, la neaperon ĉi tie de iu ajn presorgano vere klasbatalanta por la proletaro, prezentu al vi la ĝuegon travivotan, kiam okazas la legado de "Senn." kaj "S. R."! Mi estas certa, ke la samon sentas ankaŭ ĉiuj SAT-anoj en ..., kie "Senn." aperas kiel stelbrilanto sur nigra ĉielo. Bedaŭrinde, ne multe da proletoj en nia lando povas vidi la steleton. Sed baldaŭ la ĉielo sereniĝos kaj ni, kiel agloj ekflugos al bluaj horizontoj por ke ni konkeru la Tutmondon, liberigante ĝin de rutinaĵoj de naciismo kaj imperialismo!

Karulo L., ni riskas pri niaj oficpostenoj, ricevante "Senn.", sed kion fari? Per ĝi, ja, ni spiras!

Dank' al via akurateco ĉe la ekspedado nia kara "Senn." konstante nutras niajn, por sennaciulaĵoj avidajn spiritojn. Do, akceptu nian sennaciec-saluton! Daŭrigu tiel akurate labori por prospero de la tutmonda SAT-anaro, por bono de nia "Senn."

Kaj la tuta SAT-anaro laboru senlace, por ke estu disbatataj la ĉenoj de la proletaro!

Vivu Sennaciismo!
via ....

Esperanta Movado en japana Medicinrondo

En Japanio kie la lingva problemo estas pli alisignife grava ol en Eŭropo, la esp-a movado en medicina rondo lasttempe faris grandan antaŭpaŝon, precipe inter studentoj kaj profesoroj en Universitatoj kaj Kolegioj. Kelkaj medicinistoj kuraĝe publikigis siajn verkojn nur en esp-o. La ĉi-suba listo cetere elokvente parolas:

Nuntempa stato de esp-a movado en japana medicina rondo:

1. Nur esp-e publikigis siajn verkojn:

D-ro M. Murata, pri la serodiagnozo ktp.
D-ro T. Ogata, pri koksarkomo ktp.
D-ro T. Ogata kaj aliaj, pri la rizmalsano de birdoj ktp. (2 raportoj).
D-ro H. Kasai, pri la vakcino ktp.
D-ro S. Nishi, pri la trunkomuskolaro.
D-ro K. Takegami, pri stephanulus dentatus.

2. Esperantaj grupoj en medicina studentaro ekzistas en:

Tokio, Imperia Universitato (Eskulapida Klubo)
Kioto, Imperia Universitato
Kiushu, „ „
Keio, Universitato en Tokio
Okajama Medicina Fakultato
Chiba „ „
Jikeikai „ „
Tokio „ Kolegio
Nihon „ „

3. Fervoraj profesoroj por esp-o:

D-ro S. Nishi, profesoro anatomia en Tokio, Imperia Universitato
D-ro T. Ogata, profesoro patalogia en Tokio, Imperia Universitato
D-ro Fujinami, profesoro patologia en Kiota Imperia Universitato
D-ro Sh. Mocizuki, profesoro anatomia en Keio, Universitato
D-ro Tamura, en Okajama Medicina Fakultato
D-ro Nagasawa, profesoro patologia en Nihon, Medicina Kolegio
D-ro Sasa, profesoro patologia en Tokio, Medicina Kolegio

4. Eldonaĵoj:

Medicina Krestomatio kompilita de Eskulapida Klubo
Farmakologia praktiko, tradukita de Eskulapida Klubo.

Esperanto-Fakgrupo

De la turista asocio "La Naturamikoj" en Wien estis instalita laŭ decido de la konferenco de l' estraro de la lokgrupo Wien. La fondiĝkunveno okazos la duan de marto. Ĉar la grupo estas samtempe la centrejo de la tutmonda naturamika esperanto-movado, ni petas la samideanojn-naturamikojn sendi siajn adresojn al la grupestro Raimund A. Cech, Wien IX D'Orsaygasse 7/23.

≡ KRONIKO ≡

Germanio

Essen. SAT-konferenco de Rejnlando kaj Westfalio okazis la 17. januaro 1926 en la sindikatejo de Essen. Entute ĉeestis 150 gek-doj, parte de Essen kaj parte de la rejnlandaj kaj vestfaliaj urboj.

K-do Knopp kore salutante nin, malfermis la konferencon. Ni ankaŭ estis salutataj de k-dino kaj infano.

Krom nia komuna kanto "Fratoj al sun'" ankaŭ infanĥoro kantis "Kiu elterigas karbojn . . .".

Kiel prezidanto estis elektata k-do Burger (Essen). Unua punkto: artikolo "Subkonferenco" en S-ulo n-o 67. La debato estis tre vigla.

Fine oni elektis komisionon, kiu regulas ĉi tiun aferon. La komisiono konsistas el jenaj k-doj: v. d. Heid (Dortmund), Remers (Düsseldorf), Ziegler (Essen) kaj Petersen (Köln).

Nun k-do Schwenk (Essen) referatis pri la "Fundamentaj taskoj". Li klarigis bone, kompreneble la k-doj agas en partio por SAT. kaj en SAT. por partio.

Sekvis referato de k-do v. d. Heid (Dortmund). Li bone montris, ke klaskonscia laboristo ne plu povas esti ekleziano. Interalie li diris, ke en nia epoko ekzistas ekspluatantoj kaj ekspluatatoj.

En la debato k-do Egert nin atentigis al paroloj de la franco Voltaire, kiu jam en la 18. jarcento diris: "Se fakte ne ekzistus dio, ni devus ĝin fari." Pro kio? Por la popolo. Sed ĉar la venonta generacio fine devas liberiĝi, ni nepre sendu la infanojn al la senkonfesia lernejo.

Tiam k-do Remers montris al ni nian taskon rilate al Radio.

Radio estas helpilo, por disvastigi nian kulturon. Ni ne aliĝu al burĝaj kluboj, ni aliĝu al laborista unuiĝo aŭ fondu laboristajn unuiĝojn.

Ĉar venontan dimanĉon en Moskvo okazos tutsovetia kongreso de radioamatoroj, ni decidis, tien sendi de nia okazinta konferenco salutleteron.

Kiel lasta parolis k-do Stankeviĉ tre profunde pri tre interesa temo. "Kian lokon la homo havas inter la vegetaĵoj?" En tiu evoluo helpis tri faktoroj: 1. Imitado. 2. Transdonado de la spertoj al la idoj. 3. Kolektiveco. Ju pli oni estas kolektiva des pli forta oni estas.

Sub la punkto diversaĵoj, k-do Remers proponis, aranĝi en la gazeto demandangulon. Tie oni publike demandu pri io, kio interesas multajn k-dojn kaj oni publike respondu je tio. Sed ĉar ni ne povas decidi pri tio, la propono restis deziresprimo.

Pri "ŝakangulo" regis diversaj opinioj. Sed oni akceptis "ŝako"n anstataŭ amuzangulon, ĉar la ŝakludo estas la plej nobla ludo. Pri la deligoto al SAT-kongreso en ĉi jaro okazonta, oni nenion precizan povis diri, ĉar oni ĝis nun ja ne scias kie okazos la kongreso.

Kun la komuna kanto "La Internacio" la konferenco finiĝis. *H. Dey* (5378)

Leipzig. La grupo de junaj pioniroj en Stötteritz ricevis per esp. grandan leter-interŝanĝon kun grupoj kaj kolektivoj de junpioniroj en Sovet-Unio. Tio estas la unua fojo, ke germanaj laboristaj infanoj interkorespondas sisteme kaj metode kun rusaj organizitaj infanoj per esp. Sen esp. la surpapera postulo pri kolektiva interkorespondado de infangrupoj tute ne povus efektiviĝi. Kun granda vigleco kaj entuziasmo ambaŭflanke tiu korespondado estas efektivigata, kaj ĝi influas favore la propagandon de esp-o inter la infanoj. Bedaŭrinde aŭ ĉu ni ĝoju pri tiu amasalfluo? — tiom amase alvenis korespond-leteroj de sovetlandaj pionirgrupoj, ke oni estis devigataj fari elekton. K-doj kaj grupoj, kiuj do ne ricevis eventuale de ni la deziratan leteron, pardonu al ni, ĉar efektive mankas al nia grupeto la fortoj, la tempo kaj la mono (kvankam ne la volo), por kontentigi ĉiujn skribintojn. Pioniran saluton!

Meissen. Ĉu "Petro" kaŭzis sukceson? Ĝoje ni jesas — ekzemple: Meissen, malgranda urbeto historia — 40000 enloĝantoj — bonorganizita laboristaro — kaj kiom da laboristoj parolantaj nian lingvon? Ĝis antaŭ nelongtempe nur 1 aŭ 2. La unua provo instrui Esperanton al laboristoj sukcesis iomete. — 17 "LEA"-membroj inter ili 2 SAT-anoj —. La dua provo alportis pli bonan sukceson. Unu kurso komenciĝis kun 7 lernantoj, post la 14. instruvespero ankoraŭ partoprenas 4. (Laŭ gramatika metodo.) Alia kurso komenciĝis kun 26 partoprenantoj nun, ankaŭ post la 14. vespero, ankoraŭ lernas 23 — en ĝi estas instruita laŭ "Petro". Sendube bona sukceso. 2 SAT-anoj estas nun en nia urbo, tamen ni esperas, ke baldaŭ aliĝos al SAT kaj "LEA" pli-multe. — "Petro" estas kunhelpinta. Ni kviete tamen streĉe laboras por SAT kaj "LEA". Kunhelpu alilandaj SAT-anoj sendante al ni skribaĵojn (leterojn aŭ kartojn) por ke restu la vigleco en nia kurso kaj por ke korespondu la kursanoj kun SAT-anoj kaj SAT-sence. Adresu: W. Hertel, Vorbrückerstr. 7, Meissen, Germanio. *(3957)*

Hungario

Budapest. Kiel rezulton de la ioma partopreno de soc. dem. delegitoj en la urba deputitaro de Budapest, la urbo ĉijare inter aliaj kultursocietoj, ankaŭ la "Hungara Esperantista Societo Laborista" subvencias por 1926, per 15000 kronoj hungaraj. Mi alvokas la atenton de la kamaradoj al ĉi tiu speco de propagando precipe tie, kie estas Esp-on favoraj urbaj deputitoj. La societo dankas ĉi helpon pleje al la helpo de sia ĵus elektita prezidanto k-do Kertész Miklós, kiu estas urba deputito kaj ĉefsekretario de la sindikato de privatoficistoj. La movado en Hungario nehaltigebla disvastiĝas inter la laboristaro. Malgraŭ la grandega ekonomia krizo, kiu tre malfavore influis la membronombron de ĉiuj laboristaj societoj pasintjare, la societo nia estas la sola, kiu atingis 50% pliiĝon da membroj. Ĝi kalkulis 31. 12. 1925, 1290 membroj inter ili 25 subtenantajn organizaĵojn. La societo aranĝis pasintjare ĉ. 100 kursojn por 2200 gelaboristoj. Grandparton ni povas danki de la konstanta sukceso al tio, ke ni kun-

La "sankta jaro 1925"

(Impresoj de SAT-ano en Romo)

Petro Frapviando (920)

(Fino)

Detruo de kultura valoraĵo estas farita en la t. n. "kapela sixtina". La famkonata artisto Michelangelo Buonarroti, konata sub la noma Michelangelo (pronuncu miĥelanĝelo), sur la muron malantaŭ la altaro pentris la konatan: "Plej juna juĝado". Kiel vera artisto li pentris la homojn tiel, "kiel ili estas kreitaj de dio", sen kulturaj ĉifonaĵoj. Konkludante, ke la homoj dum la "eterna vivo" ne plu havos hont-sentojn — ili do estos purigitaj de homaj deziroj —, kaj ke ili ne plu frostas, Michelangelo tute pravas. La kristanismo opiniis alie. Post la morto de Michelangelo estis surpentrataj vestaĵoj, vualoj, floroj kaj legomfolioj. Laŭ nuna aspekto de la pentraĵo la homoj "vivas eterne" vestite. Spirite mi vidas en la ĉielo promenanta Abrahamon en antikva vestaĵo eble kun Vilhelmo, la forkurinto, portanta uniformon de iama germana imperiestreco, kun la tuta lad-kolektaĵo sur la brusto — aŭ moderna diplomato, en la okulo la monoklon. —

En ĉiu preĝejo oni montras ian interesan sanktaĵon. En la "Chiesa di Santa Maria Maggiore" ekzemple estas konservataj kvin bretoj de la "sankta kripo.[1]) Tiu sankta restaĵo nun estas adorata. Strange, en multaj aliaj preĝejoj kaj monaĥejoj ankaŭ estas konservataj tiaj "sanktaj restaĵoj". Oni eĉ faris — pardonu, trovis atestojn, ke tiuj kvin bretoj estas ĝustaj. Mi konkludis, ke, se oni kunmetas ĉiujn tiel konservatajn bretojn, oni povus konstrui grandan infan-naskejon.

Kiel "sanktaj restaĵoj" ekzistas laŭ mia scio de unu sanktulo ne malpli ol 29 kranioj. De alia sanktigita kadavro oni konservas tiom da ostoj, ke oni povus kunmeti almenaŭ 10 ostarojn el ĝi. — Kaj de ĉiu objekto ekzistas dokumento, pruvanta la "sanktan" devenon! Ho, la eklezio de la "interhoma amo" estas fervora verec-batalanto. — Vaginte trans la Via Cavour mi ekvidas la koloseon.[2]) Ĵus oni estis klariganta al hungaraj pilgrimantoj: "Ĉi tie fluis la sango de niaj martiroj! Ĉi tie la tirano Nero en abomena, terura, kruela maniero lasis mortigi la kristanojn." Persone mi scias — kaj tio ankaŭ estas legebla en ĉiu historia- kaj gvidlibro — ke nur 20 jaroj post la morto de Nero estis ekkonstruita la "Cirko Flavio", nun nomata koloseo.

[1]) La manĝujo, el kiu manĝas la bestaro en la stalo. En tian manĝujon estas naskita Jesuo kristo.

[2]) Granda amfiteatro en Rom.

Sed tio ne malhelpas. Do vespere, post malheliĝo, okazis procesio ĉirkaŭ la koloseo. Portante kandelon, la pilgrimantoj rondiris ekstere, kaj poste eniris kaj nun okazis hungarlingva prediko. — Suprengrimpinte ruiniĝintan ŝtuparon, de supre oni havis belan perspektivon. Je la nokta ĉielo la konturoj de la ruinaj muroj de la koloseo, sub ni, kiel fantomoj, la procesiantoj kun la kandelo en la mano. Kantante ili fine foriris.

Silentiĝis. — La pinioj per la karakterizaj formoj interrompas la helan horizontan strion je la ĉielo en la okcidento. Steloj brilas. Dekstre aperas en la lunbrilo la ruinoj de la Palatino kun la restaĵo de la palaco de Augustus. La nokta ĉielo kovras la modernaĵojn. La strata bruo nur fantomo sonas al ni tra la suda nokto, kvazaŭ el alia mondo. — Gladiatoroj interbatalas — Pro vivo kaj honoro — La muskoloj streĉitaj — Glavoj distranĉas la aeron — fero tintas — surda falo — La popolo krias, furiozas — kaj postulas pluan sangon. — Laŭlonge la Via Appia staras la restoj de la gloraj tombmonumentoj de tiuj, kiuj ĉi tie soifis al sango. Al sango de junaj, belaj, fortaj homoj! Sed ĉiujn atingis la sorto. La romana imperio glitis en la estintecon. — Kaj hodiaŭ? — La steloj brilas, briladas.

laboras plej intime kun la Asocio de Naturamikoj kaj Alkoholkontraŭuloj, kun kiuj la societo komune eldonas ankaŭ sian oficialan ĵurnalon. La registaro kaj ties organoj plej volante entombigus nin, kion ili pruvis ankaŭ per tio, ke la kursojn ni antaŭe devas enregistri ĉe la polico kaj peti permeson, ke ni senpage instruu laboristojn! Multloke oni ankaŭ tion malpermesas. Ekz. estis malpermesita kurso pro tio, ke ni ne havas tie grupon, oni malpermesis grupon, ĉar ĝi ne estas komuninteresa kaj endanĝerigas la ordon de la ŝtato! Iuloke oni volis malpermesi la kurson, ĉar ankaŭ burĝoj aranĝas ĝin kaj la laboristoj lernu tie, aliloke la distriktestro deklaris, ke la kurson li ne permesas, ĉar la simplaj laboristoj eĉ hungare ne scias bone kaj estus kontraŭ ilia intereso, se ni fortirus ilin de la lerno de sia gepatra lingvo. Iuloke oni eĉ respondis, ke ĝis kiam en la urbo estas tiom multe da analfabetoj, estas superflue la kurso esp-a kaj ili ne permesas. En iu urbo oni procesas kontraŭ la organizinto de la kurso, ĉar li ne enregistris kaj volas lin la polico puni, kiel aranĝanton de "sekretaj kunvenoj". Pro ĉi tiuj malpermesoj soc. dem. parlamentano k-dino Kéthly Anna, interpelaciis en la parlamento la 5. de dec. Malgraŭ ĉiuj persekutoj, ni fondis pasintjare 4 novajn grupojn kaj nun aranĝas kursojn en 10 tiaj urbetoj, kie ankoraŭ espinstruo tute ne ekzistis. Spite ĉi tiuj malhelpaĵoj, ni laboras kaj laboros en la permesitaj kadroj kun la helpo de niaj eksterlandaj kaj enlandaj fratoj kaj ni helpos per nia vojo porti al venko nian komunan aferon! *Timemulo*

Litovio

Kaunas. En nia mallibereja vivo okazis ĝoja afero. Estas malfermitaj kursoj por Esp-o al la arestitoj por laborista politiko.

Estis ĉe ni kelke da kamaradoj, kiuj memstare ellernis Esperanton — pli aŭ malpli bone el kiuj ni povas pripensi k-don Kac, kiu kolektadis kaj kunskribis grandan vortaron je esperanta, juda, germana kaj rusa lingvoj enhavanta entute pli ol 50000 vortojn. Adamovski kiu el litova lingvo tradukis esperante sian libron "La misteroj de la biblio" kiu estis malpermesita je la litova pastra reĝaro: Ĥackelesiĉ, Baltrunas, Strazas, Pranajtis kaj aliaj. Tiuj-ĉi kamaradoj, komprenante kiel grave estas por laboristoj scii Esp-on, komencis agiti pri ĝia eklernado inter la politarestitoj. Krom tio la kamaradoj sinturnis Ministraron de Kulturo por permesi instrui tiun lingvon komune en la lernejo de la politarestitoj kaj tion ili atingis: nun funkciadas regule la esp-aj lecionoj kiujn vizitadis 24 lernantoj.

La gvidanto estas k-do Adamovski.

Iz. Neretis

Sovet-Unio

Dolinskaja. 11. jan. en loka fervoja klubo okazis solena kunsido, dediĉita al unujara datreveno de l' ekzistado de Dolinska SEU-filio. Ĉeestis 450 pers.

Estis kantita "Internacio" en Esp. kaj farita raporto pri unujara agita kaj propaganda laboro.

Kun salutparoladoj elpaŝis la reprezentantoj de profuniĝoj, de Regiona Ekzekutiva Komitato, komsomola ĉelo kaj junaj pioniroj.

Post la kunsido estis prezentitaj 2 agitteatraĵoj kaj aranĝita la koncerta fako en Esp. *SAT-ano 5875*

Ivanovo-Voznesensk. En loka gazeto periode (ĉiudimanĉe) aperas "esp. angulo".

Kunvenoj de societanoj SEU ĉiuvendrede je 20 horo, (antaŭe estis ĵaŭde).

En ĉiuj gravaj oficejoj de la urbo estas disgluitaj afiŝoj de kazana eldono. En la urbo funkcias 15 esp. kursoj. *Esperkor.*

KORESPONDEJO

615: Bonvolu verki viajn respondojn pli koncize.

1972: Via manuskripto tre taŭgas, bonvolu daŭrigi.

2424: Ni jam havas sufiĉe da tia materialo. *Red.*

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k. ĉ. l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Ĉekoslovakio

— K-do *Ventura Rudolf, Plzen-Letná,* dez. koresp. L., PK., PI. k. ĉ. l.

Ĉinio

— "Sanon al tutmonda proletariaro" sendas k-do *Sinpak,* 50 Ping Jeung Li Str. *Fat-Shan,* Canton.

Germanio

— "Membroj de Lab. Esp. Sekcio Löbtau" dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Adr.: k-do. *Erich Löwe,* Delbrückstr. 1, IV. *Dresden-A. 28.*

— K-do *Alfred Illner, Polsnitz 23 bei Freiburg i. Schl.* dez. interŝ. PI., PM. Respondo garantiata.

— "20 kursanoj k. grupanoj dez. vigle koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L., PK., PI. Ĉiama k. tuja resp. garantiata." Adr.: k-do. *Willy Fleissner, Burkhardtsdorf i. Erzgeb.*

— Junrev. esp. grupo "Marto" dez. koresp. pri ĉ. temoj, L., PK., PI., PM. k. ĉ. l., nepre resp. Adr.: *Vilko Wege,* Grünstr. 13, *Halle a. S.*

— K-do *Kurt Zschuckelt,* Langestr. 14. *Riesa-Weida i. S.* dez. koresp. k. ĉ. l. gek-doj, precipe pri politik-ekonomiaj temoj. L., PK. Respondo garantiata.

Hispanio

— K-do *José Salom* (fraŭlo, manlaboristo) calle Weyler, 82, *Pla de Natesa* (Mallorca), dez. interrilati kun gekomunistoj ĉiulandaj, ĉefe el Sovetio, L., PI., nepre resp.

Litovio

— K-do *S. Ŝipelis,* arbaristo, Ramygalos 71, *Panevezys,* dez. koresp. pri ĉ. temoj, L., PI., bfl. k. ĉ. l. Mi resp. al ĉiuj. Mi ankaŭ serĉas interkorespondanton arbaristan por specialaj interrilatoj. Koresp. ruse, pole, germ. k. esp.

Sovet-Unio

— K-do. *Jan Klys,* Poŝtkesto 33, *Minsk,* dez., serioze koresp. pri lab. vivo, movado kaj kun instruistoj pri instruado k. pedagogio. Sendu unue artikol-leterojn, al PK. kaj mallongaj let. ni ne resp.! Ankaŭ sciigu, ĉu vi permesas, ke viajn artikolojn ni uzu por niaj gaz.

— Transporta Laborista Grupo "Pogruzka" interŝ. L. PK. PI. k. ĉ. l. Adr.: k-do *S. Liberman,* str. K. Libknecht, 1, Pokruzka, *Odessa.*

— K-do *M. L. Aleksandrev,* ul. Pesoĉnaja 66, kv. 7, *Leningrad,* dez. koresp. pri kom. movado, vivo de laboristoj, aktualaĵoj k. ĉ. l.

— K-do *M. Andrejev,* Vokzal-telegraf, *Leninsk-Turkmensk,* dez. koresp. kun fervojistoj, L. PK., PI. k. ĉ. l.

— "Ĉiuj virinaj organizaĵoj k. apartaj virinoj estas petataj sendi materialon por nia intern. virintago (la 8. marto) ekz. rememoraĵoj el lastaj jaroj. Ĝi estas uzota por esp. propagando inter virinoj de Sovetio." Adr.: *V. S. Ivanova,* B. Oĥta, Goruŝeĉnaja, ul. 14, *Leningrad.*

— K-do *Plaĉinda A.* str. Pogola, 6, *Dolinskaja,* Ekaterinosl. gub. dez. koresp. pri sciencaj k. teknikaj temoj, L. k. ĉ. l.

— "Membroj en Esp. rondeto de vilaĝana Klubo dez. koresp. pri ekonomiaj temoj kolektive kun proletaraj organizaĵoj ĉiul. Priskribu en la unua let. viajn vivkondiĉojn k. kulturajn atingojn." Adr.: *Dolinskaja, Ekaterinosl. gub. Rajselbud.*

— K-do *Bazilo Ĵeleznjakov,* do vostrebovanija, *Sverdlovsk,* pri sindikata movado, kluba laboro k. vivo de fervojistoj, fervoja laboro k. ĉ. l.

— K-do *J. Ermakov,* fervojlaborista korespondanto, Uralskaja ul 6, *Samara,* kun ĉiul. laboristoj, precipe kun fervojistoj.

— K-do *A. Verŝinin,* gvidanto de junpionira taĉmento, Poŝtkesto, 56, *Vladivostok,* kun ĉiul. jun-komunistoj.

— "Membroj de Lab. Klubo" dez. koresp. kun ĉiul. laboristoj pri ĉ. temoj, precipe pri komunismo, junula k. profesia movadoj, pri kluba laboro. Adr.: *Kruĵok Esperanto,* Klubo Lenina, *Rtiŝĉevo,* Sar. gub.

— K-do *M. Ŝapirovski,* Puŝkin-str. 45, *Kremenĉug,* pri laborista vivo "Ruĝa Helpo" k. cet. temoj, k. ĉ. l. L., PK.

— K-do *M. P. Sabo,* C. K. Svjazi, k. 206, Dvorec Truda, Solanka, 12, *Moskvo,* pri stato de lab.-movado en tuta mondo. Akurate resp.

— Du lernantinoj dez. koresp. pri lernejaj temoj kun tutmonda gelernantaro. Respondo nepra. Adr.: *L. Kravcova,* Ul. Fr. Engels, 20, *Rostov-Don.*

— "Esp.-Kursoj" dez. koresp. kun k-doj ĉiulandaj pri div. temoj. Adr.: *Por Kursoj,* poŝtkesto, n-o 82, *Rostov-Don.*

— K-do *G. V. Naumov,* Nikolskij pereulok, 123/170, *Rostov-Don,* serĉas seriozajn korespondantojn pri lab. temoj. Resp. garantiata.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG